

| | | | |
|---|---|---|--|
| Johann Wolfgang von Goethe, Knab' rozeton vidis li | Johann Wolfgang von Goethe, La rozeto | Johann Wolfgang von Goethe, Heidenröslein | Johann Wolfgang von Goethe, Dornrozeto |
| <i>tradukita de Joachim Gießner</i> | <i>tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof</i> | | <i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i> |
| Knab' rozeton vidis li; erikeja floro. Juna, bela estis ĝi. Por admirri kuris li ĝoje kun adoro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro. | Knabo vidis – jen rozeto Sur la kampo staras; Bela, juna la floreto ... Vive kuras la knabe- to, Ĝojas, miras, flaras. Sur la kampo la ro- zet' Kiel infanet'. | Sah ein Knab ein Röslein stehn, Röslein auf der Heiden, War so jung und mor- genschön, Lief er schnell, es nah zu sehn, Sah's mit vielen Freuden. Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden. | Vidis knab': Jen, ju- na flor'! Rozujet' kampara! Bela, kiel la aŭror'! Li alkuris ĝoje por Vidi, kiel kara! Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara. |
| Diris knab': „Mi rom- pos vin, vi rozeta floro“. Diris roz': „Mi pikos vin, ke vi ne forgesos min, premas min doloro.“. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro. | Knabo diris : « mi eltiros Belulinon mian »; Floro diris : « vi for- iros, – Per pikiloj mi dissiros Tuj la manon vian ». Sur la kampo la ro- zet' Kiel infanet'. | Knabe sprach: „Ich breche dich, Röslein auf der Heiden!“ Röslein sprach: „Ich steche dich, Dass du ewig denkst an mich, Und ich will's nicht lei- den.“ Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden. | Diris knab': Mi volas vin, Rozujet' kampara. Diris roz': Mi boras vin, Ĉiam vi memoras min, Pro l' dolor' amara. Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara. |
| Knab' sovaĝa rompis gin; erikeja floro. Rozo ja defendis sin kaj sufere pikis lin, ne utilis ploro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro. | La sovaĝa knab' ri- dante La rozeton prenis, – La floreto batalante Sin defendis pikad- ante, Sed la sorto venis. Sur la kampo la ro- zet' Kiel infanet'. | Und der wilde Knabe brach 's Röslein auf der Heiden; Röslein wehrte sich und stach, Half ihm doch kein Weh und Ach, Musst es eben leiden. Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden. | Knabo rozon ŝiris do De l' rozuj' kampara, Ĝi, defende, pikis tro! Sed ne helpis ve kaj ho Kontraŭ vol' barba- ra. Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara. |
| ... | ... | ... | ... |

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)

Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).*

Arg-1022-2069 (2014-05-23 13:04:27)

La poemo troviĝas en <http://de.wikipedia.org/wiki/Heidenröslein>. Melodioj estas audeblaj en <http://ingeb.org/Lieder/saheinkn.html>. La plej konata Melodio estas tiu, kiun verkis Heinrich Werner. Pri tiu vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_\(Komponist\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_(Komponist)).

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kalocajo, *1911 – †1976).*

Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)

Tiu ĉi poemesperantigo troviĝas interalie en <http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm>.